**La babiladaj rondoj** okazas vendrede je la 19a horo. La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (**ĉef**manĝon kaj deserton). La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, la gastiganto preparas terpomojn kaj deserton. La gastoj alportas fromaĝojn, trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. La salono estas pagata el la kaso

Aliĝu perrete al unu aŭ al la alia grupo.

**"Ambaŭ grupoj"** ĉe Espace Dickens

Ve, la 16-an de marto,
organizata de Francisko



**"Okcidenta grupo":**

**Ve, la 23-an de marto**
ĉe Gérard Corpateaux
Avenue du Grey 48, Lausanne
079 174 52 77

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orienta grupo":**

**Ve, la 9-an de marto**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74 / 079 393 32 63

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6


## Laŭzana Esperanto - Societo

ĉe F. Randin - ch. de Vallombreuse 14 * CH - 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
https://www.facebook.com/esperantolausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 -
Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

marto 2018 - n° 03

Kunsidoj okazas monate
ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Lausanne

Lunde, la 5-an de marto 2018, je la 20-a

## Sébastien Moret

*docteur ès lettres, maître assistant en linguistique slave à l'Université de Lausanne, interlinguiste, a été appelé à présenter le 11 décembre 2017 à l'UNESCO à Paris une conférence sur le sujet « **Pourquoi l'espéranto s'est-il imposé ?** ».*

## « Kial venkis esperanto ? »

⇨ Lunde la 9-an de aprilo
*Decidota*

⇨ Lunde la 7-an de majo
*Decidota*

⇨ Sabate la 23-an de junio
*Jara ekskurso en Morges*
*Programo venos siatempe.*

*La plej malfortuloj venĝas sin.*
*La plej fortuloj pardonas.*
*La plej feliĉuloj forgesas.*



# Jara asembleo, nova kotizo

La jara asembleo okazis la 5-an de februaro. La asembleanoj decidis altigi la jarkotizon de la aktivaj membroj.

- *Ni informas ĉiujn, ke la jarkotizo en 2018 altiĝas de Fr 50.- al Fr 60.- Ĝi permesos pagi el la kaso la sumon de po Fr 80.-, prezo de la salono en Espace Dickens por ĉiuj renkontiĝoj (monataj kunsidoj kaj grupaj babiladaj rondoj). Tiel la partoprenantoj ne plu bezonas surloke pagi ion. Do bonvolu atenti pri ĝi por via kotizo 2018. Se ĝi jam estas pagita, bonvolu pagi la pliajn Fr 10.-. (Por la paro : CHF 80.- + 20.- = 100.-)*

# Filmo "La Magia Lando"

La scenaro de tiu filmo estis preparita dum 2014 far grupo da membroj de nia societo. Nun ni estas pretaj filmi kaj "surbendigi" la rakonton venontsomere. Romeo ludos la ĉefrolon. La filmado komencos la 28-an de aprilo kaj daŭros kelkajn sabatojn. Tial ni ne plu ĉeestos en la bazaro en 2018. Nia filmo bezonas monhelpon. Subtenu ĝin (vi kaj viaj amikoj) pagante donaceton pere de partoprena financo *(financement participatif)*. Vidu rete kaj partoprenu ĝin. La mendo finiĝos la 28-an de februaro. Do rapidu. Antaŭdankojn al vi.

https://www.kisskissbankbank.com/film-en-esperanto-la-magia-lando-filmo-en-esperanto

Dmitrij Davidov

**Bona mareto la sankta Bajkal'**



Bona mareto la sankta Bajkal',
bona ŝipeto la fiŝa barelo.
Hej, **barguzino**, konduku min
al tute ne fora jam celo.

Longe min ĝenis la fero de ĉen',
Longe mi vagis en montoj dezertaj,
Olda kompano min helpis, kaj jen
Fuĝas laŭ vojoj mi certaj.

**Ŝilkon** sukcesis mi pasi sen bar',
Montaj gardistoj min fine ne trovis,
Besto ne murdis min en la arbar',
Kuglo min trafi ne povis.

Nokte paŝadis en kaŝo mi, dum
Povis min kapti okul'de urbano,
Knaboj vilaĝaj regalis per fum'
Kaj kampaninoj per pano.

Bona mareto - la sankta Bajkal'
Bona veleto - la jako miltrua...
Hej, barguzino, gajnita batal'...
Tondras tempesto milbrua !

Barguzino : nordorienta vento sur la lago Baikal, tre forta, kaŭzanta ŝtormon.
Ŝilko : transbajkala urbeto. Dum la cara epoko, tie loĝis gardistaro, kies tasko estis kapti fuĝintojn de la siberia punlaborejo.